2-a Jaro, N-o 28 (80)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

8. Aprilo 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

HONTAĴO DE LIGO DE NACIOJ

Ekzistas homoj, kiuj jam ofte diris, se la L. d. N. jam estus ekzistinta en jaro 1914, la milito eble ne estus okazinta. Malgraŭ la "paca laboro" de tiu ligo — ni nur memoru al Maroko, Mosul ktp. — Multaj homoj kredas ankoraŭ ĉiam al la "forto" de tiu rondo de "noblaj viroj". Ĉar ekzistas homoj, kiuj neniam povas lerni el la faktoj, ili ĉiam nur kredas al tio, kion ili ideale imagas al si. Sed malgraŭ tio perdos — se ankaŭ nur malgrandan procentaĵon — tiu aro da homoj parton da blindaj anoj, kiu nun fariĝos vidanta per la nova malforteco de Ĝenevo. Tiu nova fiasko de Ĝenevo estas, ke oni tie ĉi eĉ ne estis sufiĉe forta por akcepti membron. Fakte pro malpaco en la ligo de paco oni ne povis akcepti membron. Preskaŭ paradoksa! Do, grandan kaj gravan landon en la koro de Eŭropo sen kies partopreno neniam povus ekzisti normala stato por la paca laboro en Eŭropo — kio estas tre grava por tia instituto — oni ne povis akcepti — ne malgraŭ la multaj matenmanĝoj, kvin-horaj teoj ktp. Kion nun diras la multaj pacamikoj sur la tute malĝusta vojo por atingi pacon. En kolero ili insultas pri Brazilio pro ties obstineco. Kaj germanaj pacifistoj troaj eĉ ĝojas ankoraŭ pri la belaj vortoj de la "aktoroj" Chamberlajn kaj precipe de Briand. Malgraŭ ĉio!

En ilia ĝojo pri la koraj vortoj de Briand ili eĉ tute forgesas la doloron, ke oni ne akceptis la junan respublikon, — kiu ankoraŭ povas esti pli kora ol Briand; sed al ĝiaj monarĥistaj — en la L. d. N. Germana laborista gazeto kuŝas antaŭ mi, en kiu mi legas artikolon en kiu oni eĉ skribas: "Germanio kaj Francio estis unuiĝintaj en Ĝenevo en la defendo kontraŭ sudamerika postulo. Tio estas depost militfino la unuan fojon, ke ili kune entreprenas gravegan diplomatan faron kontraŭ tria lando. Kaj tiu ligilo, kiu nun forte unuiĝas por la 175 tagoj, kiuj ĝis la 6. septembro[1]) pasos, fariĝis ankoraŭ nur pli profunda per la neakcepto de Germanio en L. d. N., kio estas en aliaj vortoj per la brazila kontraŭo." La daŭrigo de la artikolo estas preskaŭ nur unu granda laŭdo por Briand. Jes, se oni *nur* rigardas la vere belan, idealistan paroladon de Briand, tiam oni jam povas juĝi kiel supre, sed oni ne devas forgesi la agojn de tiuj sinjoroj, — kiujn ili faras ankoraŭ samtempe. Multaj lasis sin trompi per tiaj belaj vortoj kaj ne povas ekkoni la verecon, ke L. d. N. nur estas centra negoca oficejo de imperiismo. En la kunsidoj de ĉi centra negoca oficejo de imperiistaj ŝtatoj oni priparolas, kiamaniere la grandaj financ- kaj industriaj grupoj povas gajni pli da mono. La delegitoj de la unuopaj landoj ja estas nur reprezentantoj de grandaj financ- kaj industriaj grupoj. Sed atingi pli grandan profiton estas ne tiel facile, ĉe la hodiaŭaj ekonomiaj cirkonstancoj tutmondaj. La landoj ekstereŭropaj, al kiuj oni antaŭ la milito eksportis nun fariĝis dummilitemem eksportlandoj. Kiel nun solvi la problemon de pli-profito? La imperiistoj ne trovas (ne povas) alian solvon ol subpremi la koloniojn kaj duonkoloniajn landojn — subpremi ilin kompreneble kun la pafiloj de la liganaj registaroj. Kial laboristoj helpas subteni tian politikon — kial ili subtenas la sangofluon en Ĉinio, Maroko, Hindio ktp.? Ĉu vi ne rimarkas, ke la sama Briand, kiu blindigas vin per siaj belaj vortoj tie kunhelpas? Ĉu vi ne scias, ke la samaj Briand kaj Chamberlajn subtenas aŭ eĉ gvidas (precipe estis Chamberlajn) la politikon kontraŭ la sola laborista lando Rusio — la "Orienta Kontrakto" de Locarno, kiu postulas, ke Germanio lasas tramarŝi fremdajn armeojn trans sia teritorio okaze de milito kontraŭ USSR — Germanio eĉ devas eble partopreni. Do, kial subteni la "vost-imperiisman politikon" de Stressemann kaj Luther (germanaj ministroj, kiuj gvidis la germanan delegacion en Ĝenevo). Stressemann kaj Luther ne povas alie laŭ ilia deveno. Sed oni devus postuli, ke laboristoj povas alie pensi. Ili devas scii pri la forta kaj riĉa laborista lando USSR.

Chamberlajn kaj Briand nun bezonas Germanion pro la eventualaj grandaj decidoj estontaj kaj, ke ĝi ne troviĝos tiam sur la alia flanko. Germanio devas ludi la rolon de viktimo. Do "la ligilo, kiu tiel forte unuiĝas kaj ankoraŭ fariĝis pli profunda" oni povas finfine liveri kiel glavon kontraŭ la tuta laboristaro. Kelkaj eble diras, ke mi vidas tro nigra, sed mi opinias, ke estas pli bone iomete pli senmaskigi ol sin ebriigi per iluziaĵoj.

Ĉu Brazilio estis la vera pekulo sola, ke oni ne akceptis Germanion? Ĉu Brazilio — lando ekster Eŭropo — estas tiel forta, ke ĝi povas malhelpi la harmonion de

[1]) La tago por kiu oni petis la Germanojn ree veni Ĝenevon kaj petegi denove je akcepto en L. d. N.

Eŭropo? — Kaj harmonio de Eŭropo estas unu el la ĉefaj celoj de L. d. N. — Kaj estis la plej gravaj landoj de tiu ligo Anglio kaj Francio tiel malforta? Ne, Brazilio ne estis la sola pekulo, estis la "pacherooj" Briand kaj Chamberlajn. Tiuj ambaŭ estis, kiuj malantaŭ la kulisoj faris promesojn al Polio en Locarno. Per ilia sekreta diplomatio — kontraŭ kiu batalas L. d. N. — ili kulpigis la novan hontaĵon de Ĝenevo. Tiuj ambaŭ semis venton kaj rikoltis ventegon. Se nun ekzistas tre akraj konfliktoj tiam oni ne povas plu atendi, ĝis ke la L. d. N. disfalos. Fakte oni ne povas plu atendi, se oni eĉ ne kapablis akcepti membron.

Ni ankoraŭ havos ofte okazon vidi samajn spektaklojn en Ĝenevo kiel la lastan, ĉar ili ne kuraĝas ekkoni la veran solvon de la problemo — la fondo de nova sociordo. Eĉ se oni ĝin volis solvi ĉe la "verda tablo" en Ĝenevo oni ne povus, ĉar tiu nur povas esti la faro de la laboristaro kaj ĉar tiu vojo neniam povas gvidi al tiu celo. Al libereco nur gvidas vojo tre kruda — golgata vojo.

Oŝo 1390.

Voko el Hispanio

Ĝenerala stato de l' laboristaro

De longaj jaroj la hispana turmentata proletaro suferadas sub jugo de drakona reĝimo, kreita kaj subtenita de militistnobela, ekleziula kaj burĝa kastoj, perfekte kuniĝintaj.

Sed precipe, de kiam la klerikaleca militistaro "perforte" prenis la povon kaj la sangefama generalo, M. Anido, (kiu tiom da indaj, noblaj laboristoj igis mortigi sur la stratoj de Barcelono antaŭ 5 jaroj laŭ la tiel nomata "forkura leĝo" inventita de li, kiu konsistis en tio, ke survoje al malliberejo, dumnokte, fipolicistoj pafmortigis senarmajn kaj ligitajn kamaradojn sub falsa preteksto, ke ili provis forkuri. Tio vekis nenian indignon eĉ en liberalaj burĝrondoj) estis akceptata kiel membro en la Direktorion, eksentiĝis registara premo ĉe laboristaro, ĝis fine oni fermigis la sindikatojn, deklaris eksterleĝa la kompartion, persekutis kaj enkarcerigis la plej kapablajn gvidantojn, inter ili k-don Maurin, kiu ankoraŭ restas en kastelo, Montjuich (pron: Montĵuik) kiu estis mortpafita, kriante: "Vivu la moderna lernejo!!!" ĝia glora fondinto, Ferrer.

Ĉiuj ĉi malagrablaĵoj travivitaj semis la malfidon kaj konfuzon en la laboristvicoj, kiuj forgesis, ke *la malunuiĝo estas multe pli timinda ol ĉiuj malamikoj,* kaj estiĝis kaj estiĝas senfinaj diskutoj kaj disputoj pri la vojo irenda, ĝis tia grado, ke la laboristaro estas ĉiutage pli dividita, kio kaŭzas grandan ĝojon kaj kontenton ĉe la regantaj klasoj, kies malnoblaj apetitoj pliakriĝas, nerespektante, en multaj laborejoj, la leĝan okhoran labortagon, pro kiu oni tiom longe bataladis.

Do, fakte oni povas senerare certigi, ke nun en ĉi lando estas neniu forto organizita, povanta kontraŭstari, eĉ nek kontroli la agojn de la absoluta, ĉiopova, episkope konsilita registaro uzurpanta la rajton de popolo kaj nur servanta la interesojn de aparta klaso, al kiu ĝi estas submetita. Pruvas tion, ke ĉiufoje kiam la sindikatistoj, en Barcelono sin direktis al provincestro kun la peto, ke la registaro permesu la publikan leĝan ekziston de l' sindikatoj, ili ricevis obstine nean, iafoje eĉ minacan respondojn.

Dume en Maroko elspezataj estas milionoj kaj milionoj por subigi popolon, defendanta siajn rajtojn . . . kaj tio estas demokratismo, kiel la registaro volas ŝajnigi?!

Necesas rimarki, ke en la provincoj la sindikatoj, severe kontrolataj, agadas publike, kvankam ĝiaj anoj estas konstante spionataj, kaj enkarcerigataj la suspektinduloj, dum en Barcelono, senkaŭze, oni absolute ilin ne permesas.

En tiaj jezuitecaj kondiĉoj kun la interna divido, kun ĉia speco de personalismoj, ŝajnas, ke netrovebla estas elirloko el ĉi tiu malbonodoranta, putriĝanta malluma abismo, al kiu la burĝaro alportis nin.

Nedubeble, ke baldaŭ fariĝos lumo kaj ĉiuj ekvidos klare la vojon konvenan.

Mondcivitano

Klerigado al laboristoj

En Svedio ekzistas depost jaro 1912 Kleriga Asocio Laboristoj (Arbetarnes bildningsförbund), kies celo estas: organizi studrondojn, bibliotekojn, prelegojn ktp. inter la svedaj gelaboristoj.

Estas tutlanda asocio, al kiu aliĝis sindikataj, politikaj, kooperaj kaj kulturecaj organizaĵoj.

Laŭ la raporto de la lasta laborjaro, kiu ampleksas la tempon de 1. julio 1924 ĝis 30. junio 1925, al la asocio aliĝis 20 regnorganizaĵoj kun membrokvanto de 933404, la 31. decembro 1924.

Dum la laborjaro el ĉi tiu membraro partoprenis aktive en 2005 studrondoj 25496 membroj. La bibliotekoj estis 791 kun 193465 volumoj. Temoj por la studado de la studrondoj estis en 372: beletristiko, 273: unuiĝsciado, 272: ŝtat- kaj komunumsciado, 217: sveda lingvo kun ortografio kaj artikolskribo, 158: kalkulado, 150: socialismo, 143: komunismo, 125: fakunuiĝsciado, 122: librotenado, 119: angla lingvo, 79: paroladarto kun lingvopritrakto kaj deklamacio, 58: naciekonomio, 42: historio, 38: kantado kaj muziko, 34: Esperanto, 30: alkoholdemando, 29: germana lingvo, 26: literaturhistorio, 17: kooperacio, 13: socisciado, 12: virina slojdo, 9: filozofio kaj religio, 8: geografio, 8: sociaj demandoj, ktp. Estis aranĝitaj 305 serioj kun 1522 prelegoj kaj 22 muzikvesperoj, kiujn partoprenis 29316 aŭskultantoj. La prelegoj koncernis jenajn temojn: ŝtat- kaj komunumsciado, kleriga laboro, kooperacio, historio, naciekonomio, fakunuiĝsciado, beletristikaj temoj, socialismo, psikologio, socializaj demandoj, industria demokratio, arthistorio, socia higieno, sciado pri heredeco, astronomio, alkohola demando, kaj ĝenerala geografio.

Krome la asocio aranĝas komunikojn kaj prelegojn brodkastatajn per Radio, specialajn kursojn por perfektigi gvidantojn de studrondoj, eksterlandajn studvojaĝojn ktp.

Se oni konsideras la grandan kvanton da membroj — kiuj estas kolektive aliĝintaj — ne tiom impona parto ankoraŭ partoprenas la studadlaboron; sed la asocio klopodas pli kaj pli interesi ĉiujn por ĉi laboro. Tamen por klerigado al la laboristaro sveda la asocio jam estas tre bona kaj signifa helpilo kaj faris tre gravan laboron tiurilate.

Ĉiu studrondo havas la rajton mem elekti siajn studtemojn. Rilate fremdajn lingvojn studatajn la angla okupas la unuan lokon kaj Esperanto la duan. (En 119 studrondoj estis, dum la lasta laborjaro, studata la angla lingvo: 34, Esperanto: 29, germana: 3, franca: 3, rusa: 1 kaj Ido: 1.) En multaj svedaj rondoj oni ankoraŭ imagas, ke la angla fariĝos la estonta mondlingvo. Tial tre multaj laboristoj ne liberiĝis je tiu eraro, kaj pro tio la angla lingvo pli multe estas studata. Sed estas espero, ke la laboristoj fine komprenos: nur Esperanto estas la plej bona interkomprenigilo kaj povas plej efike servi en la batalo por emancipo de la tutmonda proletaro.

Karl Johansson

Familia tragedio

Dimanĉon la 21. marto 1926 en la 12. horo meznokte okazis granda tragedio. Nia k-dino instruistino Charlotte Barth (Sat-ino 1742) mortigis sian patron, fraton kaj sin mem per revolvero. Patro kaj frato mortis post kelkaj minutoj, kaj ŝi merkredon 24. 3. 6a horo frumatene en malsanulejo.

En popollernejo ŝi instruis laŭ proletaria intelekto kaj kompreneble ankaŭ Esperanton, tial ŝi estis serioza kunlaboristino por proletaj celoj. Ŝia patro estis posedanto de granda vinrestoracio, en kiu estas nur riĉuloj, kapitalistoj kaj reakciuloj kiel gastoj. Nia k-dino bezonis sian salajron, kiun ŝi ricevis pomonate por siaj proletaj infanoj. Inter la lernej-infanaro de Glauchau, kiun ŝi instruis en la lernejo kaj ĉiuj klaskonsciaj laboristoj, kiujn ŝi instruis en Esperanto, ne forgesos la nomon Charlotte Barth. Tial ŝi havis malfacilan batalon inter la gepatroj, instruistoj, (kaj ankoraŭ) pastraro kaj ĉiu, kiu ne volas scii de proletariaro. Sed ŝin venkis nun la nerva sufero kaj la lasta fino, la tragedio.

Kurt Floss, 3832.

La ekonomia situacio de laboristoj en Litovio

En la nuna tempo, kiam regadas terurega ekonomia krizo en preskaŭ tuta okcidenta Eŭropo, kiam en Germanio, Anglio, Polio senlaboruloj nombriĝas je centmiloj, kiuj suferadas malsaton, malvarmon kaj diversajn malsanojn tiel, ke multaj el ili estas devigitaj finigi sian vivon per memmortigo, trairas en la laborista mondgazetaro preskaŭ ne notindaj la suferado kaj luktado de la proletaro en la malgrandaj landoj, en tia nombro ankaŭ Litovio. Oni ankaŭ devas atenti, ke la luktado de proletaro en grandaj landoj plifaciliĝas, ĉar ĝi estas plimultnombra kaj pli organizita; ĝi havas pli grandan eblecon por kontraŭstarigi siajn postulojn per ĝia gazetaro, profligoj, malsanejaj kasoj, disciplino. Sed en tia lando kiel Litovio, kie ĉiu libera movo eksufokiĝas, kie pri ĉiu pli kuraĝa paŝo de laboristo li ektroviĝas en malliberejo, kie la laboristoj havas preskaŭ nenian organizaĵon, — kaj kie tiu estas, ĝi pli ekzistas sur la papero ol en la vivo, kie ĝi ludas nenian rolon, ĉar ĉiun ĝian entreprenon oni punas kaj limigas je "leĝo", — estas kompreneble, ke dum ekonomia krizo la situacio de la proletaro tie-ĉi estas pli senira, pli malfacila ol en granda lando, kie la industrio estas sufiĉe disvolvita.

La malforta industrio de Litovio pli kaj pli detruiĝas. Kaj certe, pri elveturigo de siaj fabrikatoj oni eĉ ne povas paroli, ĉar pro la malesto de novaj maŝinoj kaj bezona krudaĵo, ilia kvalito estas tre malbona kaj konkuradi sur la alilanda merkato per iu maniero ĝi ne povas. Male — la lokaj laboraĵoj elpremiĝas per alilanda fabrikaĵo. Eĉ en la lando mem. Litovio kiel lando havanta 85 % terlaboristojn de ĝia tuta loĝantaro, estas pli ekinteresanta por subteni la postulojn de la kampanoj por malgrandigi iliajn impostojn. Ĉu la registaro plenumas la postulojn de la kampanoj kaj ĉu tiu alportas uzadon, estas alia demando. Tamen la stato de la terlaborantoj en Litovio estas tre malĝoja, kaj ĉiu, kiu interesadas je la ekonomia situacio de tiu-ĉi lando eksignas, ke la vilaĝano tie-ĉi estas malriĉa. Tio alkondukas, ke li plue elpaŝas kontraŭ la registaro de la kristanaj demokratoj; tio estas plia simptomo, ĉar la konservativa litova vilaĝanaro, kiu estis ĝis la lastaj jaroj tre religia, komencis forĵetadi de si la jungadon de la pastraro, kio signifas egale kiel la registaran blokon: kristano-demokratojn, "Ukininsku Sajunga" kaj "Darbo-Federacion".

La egajn impostojn de la vilaĝano oni per penado kolektadis kaj laŭ la vortoj de la deputatoj Kvieska kaj Sugintas dum la debatoj akcepti la buĝeton por jaro 1926, 90 % de tiuj-ĉi impostoj oni kolektadas per polica bajoneto ("Lietuvos žinios" n-o 1, 2-I-26).

Ĉe ni estas la tiel nomita "terreformo", kiu certe donis kaj donas nenion al la litova popolo. Ja oni ne povas diri ke, se la centrojn de la diferencitaj bienoj prenis por si pastroj, deputitoj de la sejmo el polico kaj opozicio, rivevis teron la litova popolo. Oni povas nur diri, ke anstataŭ la antaŭmilita bienaro kreiĝis nova "pura litova", kiel titolas sin tiuj ĉi sinjoroj. Certe nenio ŝanĝiĝis: ili tiel do ekspluatas siajn laboristojn kiel iliaj antaŭantoj. Tiuj ĉi vilaĝanoj, kiuj ricevis teron — kiujn oni tie-ĉi nomas "novaj mastroj" — ne povas fondiĝi, ĉar de la registaro ili ricevas preskaŭ nenion, por ke ili povu aĉeti kaj enkonduki vivan kaj mutan inventarojn. Multaj el ili lasas sian ricevitan teron kaj reiras al sia malnova loko. Ĝenerale la malkontento de la vilaĝano pri ĝia malbona ekonomia situacio kreskas. Alie ja tio ne povas esti: homoj kiuj fordonadas la tutan vivon al eto da tero ne havas eblecon por sufiĉe prizorgi siajn ĉiutagajn bezonojn kaj eĉ ne povas aĉeti en urbo bezonatajn por si kaj siaj mastrumadoj ilojn. Ja tio estas en la dua kvarono de la XX. jarcento en "Eŭropo". Tiaj detruitaj mastrumadoj en Litovio certe konsistas 80 % de la tuta terlaboristaro.

Kiel vivadas terlaboristoj dungitaj je minimumpagado? Ilia suferado ne finas. Oni povas kuraĝe diri, ke oni ilin devigadas laboregadi kiel brutaron, eĉ po 16 ĝis 18 horojn dum tago kaj nokto donante tre malbonan nutraĵon. Ilia malgranda salajro kompreneble ne sufiĉas por prizorgadi ilian familion. Iliaj edzinoj kaj nematuraj infanoj laboradas egale kun iliaj edzoj kaj patroj. 7—8 jaraj infanoj jam estas laboristoj; ili paŝtadas porkojn ĉe la plej riĉaj najbaroj — "pugnuloj". Ĉe tia stato kompreneble ne povas nek ili mem nek iliaj infanoj lernadi, skribi kaj legi. Se dum jaroj 1920—21 estis provita ilin organizi en profesiaj asocioj kaj ilin klerigadi per kulturaj sekcioj, la unuajn la registaro rapide fermigis kaj iliajn gvidantojn ĵetis en malliberejojn (vidu la artikolon "La movado de la profesiaj asocioj en Litovio", "Senn." n-o 69). La morteco kaj diversaj malsanoj estas tre disvastigitaj inter ili. (Daŭrigota).

La I. Internacio kaj mondlingvo

En la kvara paragrafo de l' rezolucio de la dua kongreso de l' Internacia Laborista Asocio (I. Internacio) en Lausanne (2. ĝis 7. sept. 1867) pri la 5. punkto de l' tagordo (Sociaj funkcioj. — Rolo de homviro kaj homino en la socio. — Infanedukado. — Integra instruado. — Instrulibero. — Fonografio.) ni legas[1]):

"La kongreso opinias, ke lingvo universala kaj reformo de l' ortografio estus ĝenerala bonfaro kaj forte kontribuus al la unueco de l' popoloj kaj al la interfratigo de l' nacioj."

Ni vidas do, ke la tutmonda laboristaro, kreinte sian unuan internacian organizaĵon, rekonis ankaŭ la neceson de lingvo internacia, kvankam en tiu epoko ankoraŭ neniu internacilingvo reale ekzistis.

Estas ankaŭ rimarkinde, ke la vortoj "lingvo universala" estis enkondukitaj en la cititan paragrafon laŭ la propono de *anglo* (nacio, kies lingvo estas la plej disvastigita), nome *Alfred A. Walton*, arkitekto el Brecon (South Wells, Anglio), prezidanto de l' *National Reform League* (Nacia Reform-Ligo).

Bedaŭrinde tiu-ĉi decido de l' Internacio estis forgesita kaj la nunaj gvidantoj de internaciaj proletorganizaĵoj plejparte ne komprenas la neceson alpreni la internacilingvon en la tempo, kiam ĉi-lasta jam reale ekzistas kaj estas mondskale praktikata. La devo de l' SAT-anoj estas memorigi ilin pri tio. *1334*

Represo en ĉiuj gazetoj rekomendinda. *Red.*

[1]) Vidu: Oscar Testut, L' Internationale (Paris, 1871), p. 132; James Guillaume, L' Internationale, t. I (Paris, 1905), p. 36.

El Ĉekoslovakio

La loĝeja krizo ĉiam pli kaj pli ampleksiĝas kaj kion faras la demokrataj regantoj por solvi tiun krizon? En Praha estos ŝanĝota la leĝo por la "luxus"imposto tiel, ke la posedantoj de ne pli ol 4 ĉambra loĝejo estos liberigotaj de tiu impostpago. Malgraŭ la granda loĝejmanko estas en Praha nur "6000 loĝejoj kun pli ol 4 ĉambroj. La loĝeja krizo ne povas esti pli frue solvita dum similaj cirkonstancoj, ĝis kiam la proletoj, vivantaj en la keloj, vagonoj kaj lignokabanoj, ne solvos ĝin mem.

La komplimento, kiu kostis 150000 kĉ. laŭ "Rudé Právo", ĉiuj generaloj kaj oficiroj estis devigitaj sin prezenti al la novbakita ŝtata defendministro Stribrny dum la karnavaltempo. Tiu ĉi luksa formulaĵo kostis al la ŝtato pli ol 150000 kĉ., kaj por similaj sensencaĵoj la regantoj disĵetas sumojn, kiujn ĝi elsuĉas el la laboristaro.

Pilsen 409

Internacia tago de l' virina movado

Karaj kamaradoj! Ni hodiaŭ festas internacian tagon de virina movado de 8. marto, ni hodiaŭ resumas nian laboron kaj kontrolas forton de niaj batalantoj de laborista klaso. Sed ni ne devas forgesi tiujn kamaradojn, kiuj ĝis nuna tempo loĝas sub jugo de kapitalo, kiuj suferas en malliberejoj, senkulpe pereas pro laborista afero, por liberigi ĉiujn premitajn popolojn.

Karaj kamaradoj de okcidentaj landoj, vi hodiaŭ pasigas la internacian tagon en malfacilaj kondiĉoj, sub observo de policistoj.

Laboristinoj kaj kamparaninoj de libera Sovetlando, sendas al vi sian varmegan saluton.

Kaj de hodiaŭa tago ni pliamike kuniĝos kun vi sub ruĝa standardo de laboro. Kredu kamaradoj! Alvenos tiu tago, kaj tiu horo, — kiam vi, ankaŭ libere, kune kun ni, festos la internacian tagon — 8. marto. *Labor-ino Kvasova, trad. Makŝakov*

La granda munici-eksplodo en Praha kaj ĝiaj pacifismaj sekvoj

(De nia Esperanto lab.-koresp. el Ĉekoslovakio)

Mitingo pri la kaŭzoj de la eksplodo en Truhlarskástr. de ĉekosl. polico malpermesata kaj malebligata — kiu havas intereson pri la sekretteno de la veraj kaŭzoj de la munici-eksplodo? — Brutala interveno de polico kontraŭ miloj da demonstrantaj laboristoj. Parlamentano Harus de polico mistraktita kaj je la haroj *trenita* tra la stratkoto al polickomisarejo kaj arestigita.

Por doni al vi klaran bildon, mi devas antaŭ ĉio iomete rakonti pri la eksplodo: Do Praha ĉefurbo de Ĉekoslovakio kaj tie oni plejmulte timas la revolucion de l' laboristaro, kaŭze de tio troviĝas en ĉiu angulo de Praha municiaj depotoj, kie la burĝaro ĉekoslovaka prenu en okazo de "bezono" sian provizon. Onidire ne estas la municio konservita kontraŭ la revolucio sed por milita defendo kontraŭ eksterlanda malamiko, ĉu ne estas ridinda tiu ĉi diro? Ĉekoslovakio, kiu konsistas el kvin nacioj: germanoj, slovakoj, hungaroj, rusoj kaj ĉekoj krom tio 1 miliono da komunistoj kaj granda parto de judoj volas fari militon kun eksterlanda malamiko? Tion ne kredas eĉ malgranda infano. Ĝi nur povas atendi enlandan militon, revolucion, kaj tial ankaŭ tia freneza municio-provizado de la ĉekosl. burĝaro. Municion oni transportadas de unu magazeno al alia pli konvena, kaj tiel ankaŭ okazis vendrede la 5. marto antaŭtagmeze, kiam estis transportita sur municiveturilo tra frekventa strato de l' ĉefurbo Praha kelkaj centoj da mangrenadoj, kiuj dumvoje al la "Podebrad-Kaserno" eksplodis kaj mortigis 2 akompanantajn soldatojn kaj grave vundigis milojn da homoj, kiuj troviĝis en la proksimeco. Miloj da fenestroj rompiĝis, kaj multaj domoj estas tute ruinigitaj. La loko kie okazis tiu ĉi terura katastrofo aspektas pli kruele ol vera batalkampo, ĉar la vunditoj kuŝis unu apud la alia. La polico kaj soldatoj havis plenajn manojn per ilia transportado al hospitaloj kaj hodiaŭ ankoraŭ ne povas dormi la loĝantoj de tiu strato en siaj domoj kaj vagadas tra Praha kvazaŭ militforkurintoj.

Jen la kaŭzo kial la kompartio de Praha kunvokis publikan mitingon por klarigi la kaŭzojn de tiu katastrofa munici-eksplodo dum hela tago sur frekventa str. de Praha. La kompartio volis klarigi tiun ĉi packonferencon en Praha, kiu postulis du homajn vivojn kaj tutajn vicojn de grave kaj malgrave vunditaj pacaj preterpasantoj, kaj krom tio kaŭzis kelkmilionan domaĝon materialan kaj financan. Tiaj katastrofoj konstante minacas kaj timigas la loĝantaron de Praha, ĉar en la centron de la ĉefurbo estas transportataj municiprovizoj kaj el la kazernoj de Praha nia nacidefenda ministerio faras, municimagazenojn. Sed la sinjoroj regantoj timas la klarigon de la kompartio pri la veraj kaŭzoj de la eksplodo, kaj neceseco de municimagazenoj en la centro de la urbo. La "Koalicio ankaŭ uzis ĉiun sian potencon por malebligi la pridiskuton de la terura katastrofo antaŭ la tuta publiko de Praha. La kolportistoj de flugfolioj estis arestitaj, kaj malgraŭ la ŝtata cenzuro permesis la tekston sur ili; la polico konfiskis la flugfoliojn, kiujn ĝi ricevis kaj detruis ilin. Vespere estis ĉiuj fortoj streĉitaj por malebligi la mitingon. La soldatoj estos alarmitaj, polico ekokupis ĉiujn stratojn gvidantaj al la mitingloko al "Placo de Havliĉek".

Malgraŭ ĉiu perforto amasiĝis miloj da laboristoj antaŭ la polic- kaj soldatkordonoj, kaj estos konstante de policistoj dispelitaj, tiel ke ili finfine plenigis la apud kuŝantajn stratojn. Jam dum tiu ĉi procedo okazis akraj diskutoj kaj eĉ interbataloj kaj perforto flanke de la polico. Sed tio ne estis sufiĉa, la polico baldaŭ montris, nerigardante la fundajn principojn de la demokratio, ke ĝi memvole kaj perforte dicidas sur la stratoj de Praha. Kaj k-do deputito Harus, uzante sian liberecon kiel parlamentano aliris ĉe preĝejo de "sankta Jindrich" por diri al la bruanta kunveninta laboristaro la veran kaŭzon de la katastrofa eksplodo en Truhlarskástr. Sed tiun ĉi veron la laboristaro nerajtis aŭdi. La polico devis ĉiukaze malebligi tian paroladon. Policistoj ĵetis sin al k-do Harus kaj detrenis lin el la tribuno. Kontraŭ tia agado kompreneble deputito k-do Harus kiel eble plejforte sin defendis. Malgraŭ, ke li legitimis sin al la policistoj ili kaptis kaj fortrenis lin al polickomisarejo. La polico montris, ke ĝiaj bastonoj pli valoras ol la leĝoj pri deputita imuneco en demokrata respubliko.

Policistoj trenis k-don Harus je la haroj tra la stratkoto, piedbatadis kaj frapadis lin antaŭ la ekscitita popolamaso kaj finfine ili lin enpuŝis en la polican komisarejon. Tie la policistoj sin ĵetis sur Harus kiel frenezaj.

En la policejo disvolvis fakta batalo inter la deputito kaj la policagentoj, kiuj uzis ĉiujn rimedojn kontraŭ k-do Harus, kies neordinara forto estas popolkonata.

Al la polic-komisarejo tuj venis k-doj deputitoj Bolen kaj Stern, senatoro Touzil, redaktoro Ŝafarŝ kaj k-do Vrbenskoj, kiuj akre interpelaciis kontraŭ la neallasebla interveno kaj perfortigo de deputito sur publika strato kaj en policoficejo. Poste estis skribita protokolo kaj la polica kuracisto certigis, ke k-do Harus estis de policistoj vundita, en la vizaĝo li havas sangŝvelaĵojn, kiuj devenas de la gumbastonaj batoj. Sur la dorso li havas sangŝvelaĵon kaŭzita de bastonbatoj en larĝeco de 4 cm kaj kelkajn decimetrojn longajn. Memkompreneble tiu ĉi okazaĵo ekscitis la laboristaron kaj ĉirkaŭirantajn personojn en plej alta grado. Konstante de la polico ĝenita, kiu estis embarasita de la ekscito de l' amasoj, la laboristaro foriris al

"Placo de Václav"

kie estis aranĝita provizora mitingo en kiu parolis senatano Touzil. Fine alvenis ankaŭ la ĵus liberigita k-do Harus. K-do-deputito Harus estis de ĉiuj flankoj entuziasme salutita. Baldaŭ post malfermo de l' mitingo alvenis denove forta kordono de policistoj, kiuj komencis la mitingon dispeladi. Kun abomenkrioj la popolamasoj akceptis la policon, kaj ĝis la malfruaj horoj de l' nokto promenadis rondetoj da homoj tra la stratoj de Praha, kiuj vigle interdiskutadis kaj kondamnis la agadon de la polico. *Pilsen, 409.*

SESA SAT-KONGRESO EN LENINGRAD

Unua komuniko de Kongres-Komitato aperos en proksima n-o

Sennacieca rito de l' nomdono

Jen laŭ kia plano ni plenumas riton de l' nomdono en saratova esperantmora rondeto:

1. Dum infano estas en interno de l' patrino, liaj gepatroj atentas ĉiujn cirkonstancojn, kiujn travivas ili ambaŭ, kaj elektas tiun esperantan vorton, kiu esprimus sencon de l' sumo de tiuj ĉi cirkonstancoj.

2. Kiam infano naskiĝas, patro lia priskribas ĉiujn atentitajn cirkonstancojn, esprimitajn per la unu elektita vorto, kaj informas tion al ĉiuj lokaj esperantistoj — samrondetanoj.

3. Samrondetanoj, se ili trovas pli trafan vorton por esprimi la samajn cirkonstancojn, proponas ĝin al la gepatroj. Jam estas proponataj eĉ kelkaj vortoj kiel nomoj de la tuj naskinta ido. Tiam al la gepatroj apartenas rajto elekti tiun nomon el la proponitaj, kiu pli plaĉas al ili.

4. Se samrondetanoj proponas unu nomon restas la nomo, trovita antaŭe de l' memgepatroj. Se al la gepatroj egale plaĉas kelkaj proponitaj nomoj, — tiam rondeto elektas el ili unu nomon per la baloto aŭ per loterio.

5. Tuta ceremonio de la elekto de l' nomo devas daŭri ne pli ol 10 tagojn, post kiam la ido devas esti oficiale registrita laŭ ekzistantaj regnaj leĝoj kiel portanto de la elektita esperanta nomo.

6. Pli-malpli detalaj raportoj pri la nomdonoj estas lokigataj en esperanta loka rondeto (manskribita) ĵurnalo.

Saratovo. 28. XII. 1925.

El manskribita ĵurnalo
"Saratova Rondiranto" n-o 2
SAT-ano 2985

P. S. Ni tre petas ĉiujn aliajn esp.-rondetojn informi nin, kiel vi elektas kaj donas esperantajn nomojn al viaj esperantistidoj. Sarat. esp.-mora rondeto.

Kia devas esti "Senn."?

"Senn", la sola esp-laborista organo havas malfacilan taskon. Kio pli ĝusta — esperantismo aŭ proletarismo?! Nenia hezitado! Kiom da gazetoj ni ja havas por esperantismo! "Senn." estas destinita ne nur por esp-ismo sed pli bone per esperanto por proletarismo. Estante ĉi-tia gazeto, ĝi devas priparoli ĉiujn aferojn ligitajn kun klasbatalo. Ĝi devas esti por laboristaro la tutmonda interligilo, la reciproka informanto.

Tial estas en "Senn." tiel utilaj la artikoloj priparolantaj la laboristan vivon en diversaj landoj. Por ĉi artikoloj devas esti destinata la pliparto de gazeto. Krom tio devas trovi la lokon sciigoj pri diverslandaj kaj internaciaj profunuiĝoj kaj pri laboristaj kongresoj. Ĝis nun "Senn." kontentigas ĉi deziron.

Poste iom da teorio. La legantoj de "Senn." elportos multe da profito, se ili trovos kelktempe la artikolojn pri teoriaj ekonomi-politikaj bazoj de socialismo, en formo aŭ de mallongigaĵoj el klasikuloj, aŭ en formo de memagaj pritraktaĵoj de ĉi demandoj. Nune kiam disvolviĝas inter la socialismanoj tia disorientiĝado oni devus kiel nur eble plej ofte enrigardi en la verkojn de niaj majstroj Marks, Engels kaj Lenin, kies instruoj povas esti la certaj vojindikiloj en arbarego de nuntempaj demandoj. El ĉi fako, aperiĝis bedaŭrinde ankoraŭ malmulte en "Senn.", ekz.: "Maŝino forigas laboron", aŭ: "Kion fari dum revolucio."

Kaj nune Esp-o! kiu kvankam ne ĉefa estas tamen tre grava afero. Estas proparolinda la esp-movado, ankaŭ la neŭtrala. Estas argumentinda, ĉar kaj kiamaniere servas Esp-o al proletaro.

Ne decas preterlasi la tuthomarajn aferojn, kunigotajn kun homa vivo ankaŭ en estonta postkapitalisma sociordo. Do ekz.: sendiismo, vegetarismo, interrilatoj de seksoj ktp. . . . Scienca fako? Jes vere! Estas tre bezonataj la sciigoj precipe pri tekniko, ekz.: Radio kaj higieno.

Kio ne kuntuŝas kun socia vivo, estas foriginda, ekz. la malgravaĵo: "Originala fiŝo de lago Bajkal" aŭ la sensencaĵo: "Virinseksaj mineraloj eltrovitaj de d-ro Manuilov". — Estas ja tiel malmulte da loko por indaĵoj!

Kaj la "Lernanto"? Ŝatinda fako! Kiel bone trovas vojon la sociscieco en literatura formo! Tamen kaj ĉi-tie ĝis nun mankoj. Apud la komponoj tre bonaj, kiel: "Kiu pagos la luon de la fiakro?" ni trovas superfluaĵojn sen socia tendenco, kiel: "Ĉevalvetkurado" (de neŭtrala vidpunkto bona peco). La kroniko, devas enhavi sciigojn multajn sed tre koncizajn. Ĉi-tie la redakcio ne ŝparu la ruĝan krajonon.

Sume: la mankoj de "Senn." malgrandaj — la utilo grandega. Oni atendas ĉiun novan numeron kun sopiro.

Olgamonto

Maria Pavlovna Vozdvijenskaja

Ŝi naskiĝis en jaro 1883 en tre malriĉa familio. La patro estis bulgaro, la patrino turkino. Ambaŭ mortis, kiam ŝi havis 5 jarojn. Ŝi finis gimnazion en Bolgrad (Besarabio) kaj edziniĝis kun juna instruisto V. Vozdvijenskij, kiu instigis ŝin studi muzikon kaj kanton. Bela voĉo kaj muzikkapabloj sukcesigis la unuajn paŝojn kaj ŝi rapide faris sian karieron de opera kantistino. Alveturinte Odessa'n ŝi partoprenis en granda esperanta koncerto kaj de tiu tempo neniu esperanta koncerto okazis sen ŝia partopreno. La lastajn jarojn artistino Maria Vozdvijenskaja plej ofte kantadis en laboristaj kluboj.

V. Vozdvijenskij

Pri cionismo, "Ankoraŭ"

Tro da polemikado! Ni demandis pozitivan laboron, ne polemikadojn! Ni estas tedaj pri personaj diskutadoj! Nek tempon, nek volon, ni havas por partopreni ilin! Ni ne konsentas, ke Sennaciulo estu luktejo por iuj ajn kamaradoj!

SAT-ano 5065,
R. Nikolskij (SAT-ano 5265), Rhikorski.

KRONIKO

Germanio

Orient-Saksio. La distriktkonferenco okazinta la 21. marto 1926 aprobis la laborplanon proponita de la distriktkomitato. Nova kurso laŭ rekta metodo estas nun arangâta en Sommeraŭ, eta vilaĝeto. Partoprenas 10 kursanoj. Gvidas k-do Michel. La 2. majo komencas kurso por kursgvidantoj. Gvidos k-do Scherbaum. Ekskurso okazos la duan pentekostan festotagon al Sommeraŭ. Ekskurso al Tollenstein, Ĉeko-Slovakio okazos la 11. julio, al kiu estas kore invitataj la SAT-geanoj el Dresdeno kaj Gablonz a. N. — La konferenco montris, ke per aktiveco flanke de ĉiuj distriktoj sukcesas. Ĉio estis priparolita nur esperantlingve.

Ĉe la firmao F. A. Bernhardt, Zittau, la SAT-anoj regule kunvenas dum la tagmanĝa horo por perfektigi sin. *SAT-peranto 1378*

Polio.

Lodž. La sola esper. societo, kiu gvidas nun esper. propagandon en "pola Manchester" estas la "Esper. Societo Laboro en Varsovio, filio en Lodz. La malbona financa kaj ekonomia stato de Pollando kaŭzis, ke la laboro ne donas grandan frukton kaj la Societo travivas financkrizon. Por plibonigi la financstaton, la societo aranĝis la 2. febr. 1926 liut-koncerton, kiu donis grandan profiton. 10 proc. de la profito oni donis por la senlaboruloj. La estraro decidis la tutan profiton elspezi nur por la propagandceloj. Nun la societo vigle laboras. Oni aranĝas kursojn en pola kaj juda lingvoj, en la monato aprilo du grandajn propagandvesperojn. La societo "Laboro" eldonis la unuan lernolibron de esp-o en juda lingvo de J. Lejzerović.

Ĉe la societo ekzistas gazet-serva komisio, kiu petas alsendon de materialo por tradukado en landaj gazetoj. Ĉiun oni petas adresi laŭ jena adreso: Esp. Societo „Laboro Lodz, Zamenhofa 17.

Ankaŭ la SAT-afero komencas nun en la societo ekviviĝi. *SAT-ano 1698*

Sovet-Unio

Kremenĉug. En la klubo de l' vagonkonstruaj laborejoj (Krjukov a. Dnepro) alveturinta el Polio politik-elmigrinta SAT.ano k-do Goldfeder prelegis *pri la situacio en Polio, IRH kaj la helpilo de IRH: Esperanto.*

La ĉeestintaj ĉ. 700 laboristoj akceptis rezolucion simpatian. La kunveno ankaŭ decidis sendi *malfermitan leteron al la viktimoj de l' nigra reakcio* pere de "Sennaciulo".

Identa prelego estis farita de k-do Goldfeder ĉe la kunveno de l' rivero transportistoj (ŝipistoj), kie ĉeestis ĝis 40 k-doj.

La prelegoj ankaŭ vekis grandan intereson al esp-o.

Tial k-do Goldfeder la 10. marto raportis en la klubo "Kotlov" (Krjukov) speciale pri Esp-o por la junul-sekcio de l' klubo. La raporton aŭdis 110 k-doj. Tial baldaŭ fondiĝos tie lernorondo.

— K-do E. Izgur raportis pri Esp-o por la kolektivo de l' oficistoj de "GPU" (Ŝtata Politika Administracio). La raporto vekis ĉe la 40 k-doj ĝuintaj ĝin grandan lernemon.

— Fondiĝis lernorondo ĉe la Vespera Intersindikata Lernejo (por laboristoj). Kvankam la enkondukan raporton aŭdis nur 37 k-doj, sed al unua leciono venis 50. Deziras lerni pli ol 60. Inter la lernantoj regas granda entuziasmo kaj miro pri la simpleco de l' lingvo. Gvidas k-do M. Izgur.

La lernantoj elektis rondet-oficejon: Semjonov, Novicka, Vajn.

— Grandaj sukcesoj estas atingitaj sur la kampo de l' korespondado. Nia korespondado nun tuŝas jenajn landojn: Germanio (konstante: 6 urbojn!), Francio, Britio, Svedio, Nederlando; korespondaĵoj venas el Turkio, Italio, Ĉinio, Kanado, Aŭstralio, Japanio, Manĝurio, Angola, Norvegio ktp.

Speciale vigliĝas la korespondado ĉe la industri-komerca lernejo. Multaj leteroj estas enlokigitaj en la murgazeton "Nia Resono".

Pluraj leteroj de k-do Bennewitz pri la germ.-delegitaro, vizitinta USSR, estis represitaj en la loka kaj kelkaj aliurbaj gazetoj.

Por priservi la organizaĵojn, kaj scivolemajn laboristojn kaj por interŝanĝi informaĵojn ni intencas ĉi-tie fondi "LABESKO"-n (Lab. Esp. Korespondejon). La demando solviĝos kiam ni akiros la necesan por tiu celo ejon. — *V. K.*

Kremenĉug. La 14. marto k-do E. Izgur prelegis pri *la Mondlingvo de l' Proletaro* por pli ol 100 studantoj el la Vespera Intersindikata Lernejo. La aŭskultantojn la prelego forte impresis entuziasmige.

— En la loka gazeto ĉiutaga "Naŝ Putj" aperis artikolo "ĉiu komjunulo devas lerni Esperanton".

En la ukrainlingva porvilaĝana gazeto "Radjanskij Seljanin" aperis populara artikoleto de k-do Samokiŝ: "Kio estas la internacia lingvo?"

— Nia societo "Laborista Solidareco" eldonis flugfolieton (2000) kun la artikolo priesperanta de Boguslavski (prez. de malgr. Popol-Komisariaro de RSFSR). La folieto preskaŭ tute elĉerpiĝis.

— Ekfunkciis studrondo por la junularo en la Krjukova vagonkonstruista klubo. La rondo enhavas 2 grupojn kun pli ol 40 lernantoj. Lernemuloj estas pli ol 100.

Denun nia movado komencos ankaŭ disvastiĝi en Krjukov, la transdnepra antaŭurbo de nia loko.

— La vigliĝo de l' movado helpis sufiĉan disvastigon de literaturo: dum ĉi-sezono estis akirite pli ol 200 propag. broŝuroj, 80 ekz. de "Petro", mendite ĉ. 300 Lidin-lerniloj kaj por impona sumo da plej diversa cetera literaturo.

Koĵanka, vilaĝo de Bela-Cerkov'a distrikto, Ukraino. Ĉe loka regiona sepjara lernejo funkcias Esperanto-kurso. Ĝin partoprenas ok instruistoj de l' lernejo. Gvidas la kurson k-do Stasjuk. La grupo fondiĝis sekve de artikolo "Esperanton en lernejojn!", aperinta en "Instruista Gazeto" kaj konata por legantoj de "Senn." n-o 70. *728*

Saratovo. Dum febr. n j. nia esperantmora rondeto ricevis 13 leterojn (kun jan. 20 l.): el Gera-R — 1 (479), el St. Maurice — 1 (835), el Danzig — 1, el Hamburg — 1, el Linz — 1, el Dortmund — 1, el Paris — 1, el Lublin — 1, el Wien — 1, el Kremenĉug — 1 (5350), el Moskvo — 2 (1187), el Leipzig — 1 (125). Sekve: el Germanio — 5, el Rusio — 2, el Ukrainio — 1, el Polio — 1, el Francio — 2, el Aŭstrio — 2. — Preskaŭ ĉiuj-ĉi k-doj petas informi ilin pri niaj kondiĉoj, kiujn ni supozis proponi al la k-do (ino) („Senn. n-o 16), konsentonta edukadi niajn esperantist*id*ojn. Ni ankoraŭ elektis neniun, ĉar ni ne konas, ĉu kapablas iu el la 20 k-doj prizorgi etajn infanojn. Ja niaj infanetoj estas dume tre etaj kaj ili bezonas unuavice vartistinon. Bedaŭrinde ni ne ricevis eĉ unu leteron de esperantistino, al kiu plaĉus nia supozita afero. Do niaj kondiĉoj estus jenaj: pretaj loĝejo kaj nutrado kaj krom tio salajro laŭ sindikata tarifo por la domaj servistoj (aŭ -inoj). Sed la salajro ne estas granda. Precipe dezirinda estas homo sola. – Plimultaj k-doj, skribintaj al nia rondeto estas senlaboruloj, petantaj nin trovi por ili laboron en nia urbo. Ni ne riskas ion promesi al ĉiuj, sed al komunistoj ni povas diri: ĉion, kio estos por ni ebla, ni provos entrepreni por kontentigi iliajn petojn. Nur ne rapidigu nin per tuja respondo . . . Estas dezirindaj precipe leteroj de agrikulturistoj kaj kamparanoj diverslandaj. Krom tio ni devas signi, ke Sovetunio nuntempe havas grandan mankon nur de pezmetalindustriaj laboristoj (mankas 50 000 kvalifikitaj laboristoj). Ankaŭ mankas ministoj. Ĉiuj ĉi-profesiuloj skribu pri labortrovo al "Centra Komitato de Sovetia Esperantista Unuiĝo" laŭ adreso: Moskvo, poŝtkesto n-o 630. Ĉiuj aliaj profesiuloj ne povas esperi trovi laboron en Sovetio. — Du petojn (1 metalistes kaj 1 fotografistes) k-do Taufer (politemigranta domestro en Saratovo) jam transdonis al registaro de Apudvolga Germana respubliko, kaj la peton de k-do *n-o 1008*, li transsendas kun sia letero al Moskva IRH (MOPR). Por okaze ne perfidi la kamaradojn, ni evitas respondadi per leteroj pro la letercenzuro. Tial ni petas niajn korespondantojn rigardi nian kronikon en "Senn.". — De marto (nunjara) nia esperantmora rondeto renomas sin je "sennaciecmora rondeto", ĉar nia ĝenerala tasko estas nuligi niajn naciajn antaŭjuĝojn: lingvo, religio, vesto, moraro. Nia rondeto, kiel portanto ĉi-tiun karakteron, estas *unua* sur terglobo, sed ni esperas, ke en aliaj lokoj SAT-anoj sekvas laŭ nia modelo. Kiel ĉefa simbola insigno ni elektas duoblekvinpintan steleton (ruĝa plus verda-sekve dekpinta), kiun ni nomas *"di"* — kio signifas en la moroj de nia rondeto — *"unu"*. Kiel ĉefaj simboloj de nia sennaciecmora rondeto ni akceptas jenajn naŭ simbolajn insignojn: di — 1, ĵi — 2, ri — 3, gi — 4, pi — 5, hi — 6, ci — 7, fi — 8, zi — 9 . . . Nia sennaciecmora rondeto celas konstrui sian vivon laŭ jenaj principoj: 1) edziĝoj sennaciecaj devas esti nur inter geesperantistoj kaj precipe inter diverslandanoj; 2) geedzoj esperantaj (kaj eĉ ĉiu esperantistino) devas nepre naskadi idojn, por krei novan sennaciecan generacion, kies lingvo esperanto estus patra; 3) esperantistidoj devas ricevadi nepre esperantajn nomojn, kaj specialan esperantlingvan sennaciecan edukadon laŭ esperantaj sennaciecaj ideoj. — De l' marto ni komencis 3. n-on de l' manskribita ĵurnalo, kiu estas renomita per "Saratovano" (estinta "Saratova Rondiranto"), ĉar ĝi perdis sian rondirantan karakteron: ĉiuj rondetanoj vizitadas k-don Sajapin A., kiu gvidas kaj gardas la ĵurnaleton, kaj ĉiuj legas ĝin ĉe li. — K-doj SAT-anoj! Skribu kaj sendu al ni viajn rimarkojn pri la movado de nia sennaciecmora rondeto, kaj pri ĝia direkto. Adresu al kamarado A. Sajapin, str. Respublika n-o 28, loĝ., 6 urbo Saratov, Sovetunio. *SAT-ano 2985*

RECENZEJO

Libroj

Legolibreto de J. Borel. Eldonejo: *Esperanto-Verlag, Ellersiek & Borel, Berlin SW, 61,* Wilmsstr. 5. Formato: 10×14 cm., 18 pĝ. Prezo: 0,40 mk.

La libreto estas la 4. eldono de "Esperanto Biblioteko Internacia" n-o 1. Ĝi enhavas 20 div. facile kompreneblajn fabelojn, rakontetojn kaj priskribojn. La stilo estas bona kaj facila.

Die Esperantosprache auf einem Blatte (flugfolio n-o 1) de *J. Borel.* Eldonejo kiel supre. Formato: 24½×34, Prezo: po 10 ekz. 0,15 mk., po 100 ekz. 1,20 mk.

Ĉi-flugfolio estas por germanlingvanoj. Unu paĝo koncize pritraktas la tutan esp. gramatikon, prononcon kaj vortfaradon, la alia havas aron da plej necesaj vortoj.

Invito al la Foiro de Frankfurt a. M. Printempo 1926, 11.—14. aprilo, aŭtuno 1926, 26—29 sept. Eldonejo: *Messamt (Esp.-Fako), Frankfurt a. M.* Formato: 19×28, 16 pĝ.

Tiu prospekto montras, ke oni bone komprenas apliki esp. en komercaj medioj. *Rolo*

Verda Steleto de *V. Seriŝeva* el *Barnaul (Siberio)*, Eldonejo T. Silva. Via Maria alla Porte 2. Milano (Italio) Formato 25×17, 80 pĝ. Ilustrita, Kartonita. Prezo: 12 Liroj.

Kiel prave rimarkigas K-dino *A. Janetta* en sia antaŭparolo, tian lernolibron, dediĉitan al la *"Internacia Infanaro"*, oni atendis en ĉiuj landoj, ĉar tia ne ekzistas! Malfacile oni sukcesas tiujn verkojn lerte starigi; sed, kiam oni estas, kiel la aŭtorino, *"paciencema kaj inteligenta apostolino de nova edukado"*, *koro* estas la plej certa gvidilo por tian taskon sukcese plenumi! Ekrigardinte nur la unuajn paĝojn, kaj mirinde ĉarmajn desegnaĵojn, oni tuj konvinkiĝas, ke *V. Seriŝeva* amas, kaj komprenas la infanojn, du nepre necesaj, kaj ĉefaj punktoj por eduki ilin, laŭ la vera homa senco de la vorto *edukado!* Plezurege mi tralegis la tutan volumon, haltante je tekstoj kaj desegnaĵoj plej humoraĵaj, kiel "la avo kiu plantis rapeton", kaj "la Dometo-Kranieto", kies ilustraĵoj, precipe ia gajige stranga leporo, amuzos la infanojn. Ĉiuj ekzercoj estas klare prezentitaj; kaj lerte kombinitaj por agrabla kaj plaĉa lernado. Ĉiuj versaĵetoj, kaj kantetoj bone elektitaj. Unuvorte tiu verko estas, ja, vera juveleto, kiu, ne nur feliĉigos infanojn, sed ankaŭ helpos plenkreskulojn, ne sufiĉe instruitajn, facile eklerni la lingvon, kaj kondukos ilin, senpene kaj venke, tra la unuaj malfacilaĵoj, ĝis pli altgradaj lernolibroj. Kelkaj preseraroj, cetere preskaŭ ĉiuj notitaj je la fino de l' libro, kaj korekteblaj en sekvanta eldono. Bedaŭre mi min demandas: Kial *V. Seriŝeva* ne estas SAT-anino? (lasttempe aliĝis. Adm.) Kial *Verda Steleto* ne eliris el nia SAT eldonejo? *Frida.*

Enciklopedia vortaro esperanta-germana (dua parto) de Eŭgen Wüster. Eldonis Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Formato: 17×25 cm. 160 pĝ. Prezo 15.— mk. g.

Ĉiu esperantisto scias, ke ekzistas Esp. Akademio kaj eĉ multnombra Lingva Komitato. Sed neniu scias pri la laboroj de tiuj gravaj institucioj! . . . S-ro Wüster ne estas akademiano nek L. K.-ano, sed almenaŭ li laboras, ege laboras por la esperanta afero.

Por juĝi pri la amplekso de la tasko de li entreprenita sufiĉu diri, ke tiu dua kajero atingis nur la literon F de la esp. alfabeto. Tiu vortaro estos certe la pli kompleta el ĉiuj ĝis nun eldonitaj. Ĝia grava manko estas, ke nur germanlingvanoj povas tutplene utili tiun abundan vortotrezoron.

Al tiu kajero estas aldonita (germanlingve kaj esperante) seppaĝa traktado pri "esperantologiaj principoj", kiuj verdire ŝajnas al mi iom nebulaj. Sed almenaŭ oni povas sincere deziri, ke troviĝu sufiĉe da aĉetantoj por ke la tuta verko aperu presite. *E. L.*

Kiu deziras sian adreson en
Jarlibro de SAT 1926
tiu sendu senprokraste sian membrokotizon!

Gazetoj

Represis el S-ulo: *"Auckland Labour News"*! Auckland, 1. jan. 1926, New from the East, "Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando!" (S-ulo 52). Ĉinio "Tra la klasbatalo". (S-ulo 45/46.) "Iom pri la sveda kooperacio!" (S-ulo 47.) *"Revista Popular"*, Cordoba, 15. febr. 1926. "Dekadenco de la germana kapitalismo!" (S-ulo 68.) (Servicio de la Prensa Esperantista Obrera.) *"De Arbetslosas Tidning"*, Trelleborg. "Pro nur unu Dolaro." (S-ulo 68.) ("Tör para en Dollar!") *"Dachauer Volksblatt"*, Dachau, 2. febr. 1926. "Originala fiŝo de la lago Bajkal." (S-ulo 68.) *"Nederlanda Lab. Esperantisto"*, Helder, febr. 1926, "Pri nacilingva regiona raportado al S-ulo!" Propagandas por SAT. *"L' Action Rationaliste"*, Bruxelles, dec. 1925. "Instruo en la Blankrusio! (S-ulo 60.) *"Väst-Svenska Kuriren"*, Göteborg, 3. marto 26. "La ekzekutivanoj de la brita kom. partio nun en malliberejo." (S-ulo 73.)

Represis el div. gazetoj: *"Junij Leninec"*, (Juna Leninisto), Ĥarkov, 8. jan. 1926. "Sendaĵo de Stötteritz'aj junaj spartakanoj al Odesaj junaj leninanoj per Esp!" *"Die Einheit"*, Berlin, 1. febr. 1926. "Nova gaz. por atingi la unuecfronton en la sindikata movado!" *"Berg-Echo"*, 17. febr. 1926. "Lernu Esp. sed ne forgesu la partion kaj la sindikaton." *"L' Action Rationaliste"*, Bruxelles, febr. 1926. "Kontraŭ la blanka teruro" (de la Federation Esperantiste Ouvriere). *"The Highway"*, London, jan. 1926. "La universala lingvo!" (I. Flower, SAT 3398.) *"The Labour Woman"*, London, marto 1926. "Tra la Mondo virina!"

Novaj gazetoj

La Socialisto, organo de la *Aŭstria Laborista Ligo Esperantista.* Redakcio: *Martin Klein,* Wien, XIX, Döblinger Hauptstr. 14; Administracio: *Franz Jonas,* Jedlersdorferstr. 33. 15×23, 8 pĝ. Abonprezo: 1/2 dolaro pojare.

Malgraŭ tio ke la 5. SAT-kongreso okazis en Wien, blovas tamen naciemeta vento ĉe la tiea esperantistaro. Efektive, kiel klarigi al si aliel la eldonon de tiu nova organo, kiam oni scias, ke por germanlingvanoj ekzistas jam de multaj jaroj la gazeto "Der Arbeiter Esperantist".

Estas vere, ke "La Socialisto" enhavas preskaŭ nur esp. tekstojn. Sed tio certe ne pravigas la eldonon de tiu nova gazeteto. Ĝia ekzisto povas ja nur konkurenci la organojn de SAT. Eble la eldonantoj de "La Socialisto" rebatos, ke la SAT-gazetoj ne kontentigas ilin. Nu, tiaokaze ili kritiku, ili proponu plibonigojn, ili kunlaboru kaj helpu, anstataŭ fari disigan, konkurencan laboron. *E. L.*

Internacia Radio-Revuo (n-o 1—2). Eldonas *Etienne Chiron*, 40 rue de Seine *Paris.* Formato: 24×16 cm. 32 pĝ. Prezo: 0,05 dolaro.

La ĉefredaktoro de tiu nova gazeto estas la akademiano D-ro Pierre Corret, fame konata pro sia miriga argumentado kontraŭ la uzadon de "io" ĉe landnomoj. "Turkio povas esti nur *io turka*", li senŝerce asertis. Evidente tiu stranga argumento vekis ridojn kaj mokojn ĉe multaj esperantistoj. Kaj kredeble tio senfervorigis nian akademianon rilate pritraktadon de lingvaj temoj. Ĉu domaĝe? Certe ne, ĉar hodiaŭ S-ro Corret sin dediĉas fervore al alia laboro. La eldono de fakgazeto pri Radio estas ja tre laŭdinda entrepreno, kiu povos grave antaŭenpuŝi la ĝeneralan uzadon de esp-o en la radiaj rondoj.

Mi ne priparolos la enhavon de la gazeto, kaj nur rekomendas al ĉiuj interesatoj, ke ili mendu senprokraste unu ekzempleron kaj prijuĝu mem. *E. L.*

KORESPONDADO

TARIFO

Korrespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago

MALLONGIGOJ: L — letero. PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl. — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. espaĵo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

— K-do *G. Wichtl, Blumau b. Felixdorf,* dez. interŝ. PM, k. ĉ. l. pref. kun komencantoj, ne laŭ katalogo, germ., aŭstriajn kaj hungarajn mi ne akceptas.

Estonio

— K-do *Hermann Kruus,* (j. laboristo), Vilmsi, 10—9, *Tallinn,* dez. koresp. kun anglaj k. italaj gek-doj, L, PK.

Francio

— K-do *G. Salan,* 17, rue de la Survie, *Nimes,* interŝ. PI k. ĉ. l. montrantaj artvidaĵojn: pejzaĝoj, natur- k. urbvidindaĵoj, muzeoj, pentraĵoj k. skulptaĵoj, popolmoroj.

Germanio

— K-do *Kurt Floss,* Friedrichstr. 7, I, *Glauchau i. S.,* pri ĉ. temoj, L, PI k. ĉiul. gek-doj.

— K-do *A. Strege,* Schkeuditzer Str. 44, I, *Leipzig-Gohlis,* serĉas seriozan korespondanton prefere PM kolektanton.

— **Atentu!** Kiu k-do povas havigi al mi rekompence "Sennacieca Revuo" 4a jaro, n-o 5 (35) februaro 1923? Adr.: K-do *Paul Schiller,* Langstr. 19, *Schweidnitz i. Schles.*

— K-do *Karl Oppitz,* Zorndorfer Str. 49, S. p., *Berlin,* pri vivreformo k. a. temoj L, PK, PI k. ĉ. l.

— K-do *Walter Nöbel,* Jungferngasse 22, *Altenburg,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, PK, PI, k. ĉ. l.

— K-do *Erich Tautz,* Langestr. 11, *Harburg a. E.,* dez. interŝ. PI k. ĉ. l. bfl.

— K-do *Erich Greif,* Kirchstr. 13, I., *Leipzig-Leutzsch,* dez. koresp. kun Francio.

— K-do *Max Häckel,* Altenburger Str. 18, *Leipzig S 3,* dez. interŝ. esp.-gazetojn.

— K-do *A. Liebs,* Schillerstr. 39, *Dresden-N. 8,* dez. koresp. kun tramistoj ĉiul. pri deĵorkondiĉoj, fakorganizo, kontrolsistemo, biletvendado, praktikaj spertoj per Esp. dum la deĵoro ktp. Ĉiam resp.

— K-do *Karl Götze,* Jägerstr. 6, II., *Altenburg i. Th.,* PI k. ĉ. l.

— K-do *Paul Heimann,* ĉe Schubert, Büttnerstr. 9, II., *Schweidnitz i. Schles.,* pri lab. k. esp. movadoj, interŝ. PI, gazetojn. Ĉiam resp.

— K-do *Kurt Reichert,* (19 j.), Hendrichstr. 14, ptr., *Klotzsche b. Dresden,* precipe pri revolucia movado. Ĉiam resp.

Hispanio

— S-ro *Gabriel Meneu,* Sindicato, 17, *Palma de Mallorca,* interŝ. L, PK, PI, PM. k. ĵurnaloj.

Polio

— K-do *Stefan Kaluscha* (Redaktoro de Vorto), Lubelska 33, *Radom.* Kiu sendos al mi tutan kolekton da PM de sia lando, mi reciproke rekompencos laŭ deziro per PM, unue mi ne sendas.

— **Kamaradoj!** En aprilo la tarnova SAT-grupo aranĝas propagand-vesperon. Ĉiuj alsendu L, PK, PI k. div. propagandilojn. Multaj koresp-aĵoj pruvu al niaj lab-istoj pri disvastigo de esp-o inter la proletaro. Adr.: *T. Lesiak,* str. N. Sviat, 1, *Tarnov.*

Svedio

— K-do *Ragna Glans,* Pl. 124, *Norrahammar,* L, PK, PI, k. ĉ. l.

— K-do *Ernst Lagerstrand,* Pl. 113, *Norrahammar,* L, PK, PI k. ĉ. l.

— K-do *Dag Sandberg,* Pl. 66, *Norrahammar,* L, PK, PI k. ĉ. l.

Sovet-Unio

— K-do *A. Jodko,* Ananjevski per 5, kv. 5, *Moskvo,* dez. seriozan koresp. pri arkivaj aferoj.

— K-dino *Natalio Talantova,* Sretenskastr. d. Gribova, *Ivanovo-Vosnesensk,* dez. koresp. kun junaj esp-istoj ĉiul.

— K-dino *Nina Vinokurova,* 2-a Krasnoprudnaja, d. 18 *Ivanovo-Voznesensk,* kun junaj esp-istoj ĉiul.

— *Skribu al 10 junaj k-dinoj!* Adr.: "*Desjatka Esperantistok*", 2-a ŝkola 2 ŝtupo Stepanovastr. *Ivanovo-Voznesensk.*

— K-do *Gavriil Mokrecev,* invalid-pensiulo, g. *Oranienbaum,* Leningr. gub. d. 8, kb. 1. dez. koresp. pri ĉ. temoj. Resp. gar.

— K-do *N. Borisov,* (aŭtoro de la filmo "Ukrazio") ul K. Liebknechta, 46, 7. *Ĥarkov,* dez. koresp. pri kinematografio kun scenartistoj, reĝisoroj k. a. interesiĝantoj pri arto, interŝ. specialajn kinematografiajn gaz. k. a. similaj eldonaĵoj.

— "*Esp-grupo*" koresp. kun ĉ. l. pri divers. temoj. L, PK, PI, akurate resp. Klub pri Stancii Ivanovo, *Ivanovo-Voznesensk.*

— "*Gub. Fak. SEU*" interŝanĝ. let. k. artikol. porgazetajn kun gek-doj ĉ. l. *dom Rabotn. Prosveŝĉenija,* Socialska str. *Ivanovo-Voznesensk.*

— "*Grupo de junaj geesperantistoj*" dez. koresp. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Respondo garantiata. Adr.: *Pedagogia Teknikumo, Kozelsk,* Kaluga gub.

La Pentristo

A. Rajzen

Kiel memoraĵo al RoKo — la tradukinto

Li preteriris grandan, malnovan domon, situatan en longa, malriĉa, bruanta strato. Ĉe la pordo de ia teretaĝa loĝejo staris juna, malriĉa virino kun infano sur la manoj, kaj ambaŭ, la patrin' — kaj la infano, rigardis ien malproksimen, malproksimen, super la altaj domoj, super la kamentubojn de fabrikoj, super la densan nigran fumon, leviĝantan de kamentuboj . . .

Ambaŭ rigardoj esprimis mutan peton: Ho ve, prenu nin tien, tien; — surtere ni jam tro suferas, ni sufokiĝas ĉi-tie sen aero, sen lumo . . .

Kaj en ĉi-rigardoj estis tiom da malĝojo, tiom da zorgoj kaj sopiro, ke la koro de l' pentristo plenpleniĝis per kompato kaj kunsento. — Jen la bildo de l' mizero mem! — diris li en la penso — kia bela kaj majesta, kia kortuŝa la bildo estas! . . . Dio mia . . .

Li entuziasmiĝis. Li ree rigardis la vivantan bildon kaj rimarkis la samajn okulojn, la saman malĝojon, la saman petegon: tien, tien! Kaj kvazaŭ puŝita de ia nekonata forto, li kuris hejmen.

— Mi kreos tian bildon! — ekkriis li laŭte, enirante en sian laborĉambron.

Kaj tri tagojn li estis kvazaŭ alforĝita ĉe la tolo. Tri tagojn li nek manĝis, nek trinkis, nek vidis iun. Li volis krei ĝuste tiun bildon, kiun li vidis sur la malriĉa bruanta strato.

Kaj li sukcesis.

Kiam ĝi estis finita, li rigardis ĝin per interna ĝojo. Li estis feliĉa. Liaj rigardoj radiis. Ŝajnis, ke ne bildon, sed feliĉon li kreis por si.

Li nomis la bildon "Mizero" kaj sendis ĝin je ekspozicio.

La kritikistoj rimarkis ĉi bildon, oni ĝin admiris. La publiko entuziasmiĝis. Ja riĉa spertulo aĉetis ĝin por multe da mono.

— Vi estas senmorta! — diris al li sekvintan tagon unu fama kritikisto. — Via bildo vivos eterne!

La pentristo estis kvazaŭ ebriigita pro feliĉo: Li estas verkinta eterne-valoran bildon . . .

Kiam li nur iomete eksobriĝis el la unua feliĉo, komencis lin vizitadi venena penso: — Kie troviĝas la malriĉa virino kun sia infano?

Post kelka tempo la penso fariĝis pli venena:

— La bildo sur la tolo estas senmorta — sed kie estas la vivanta bildo tie en la malriĉa strato . . .

Kaj la penso fariĝis pli kaj pli akra. Ĝi ne permesis al li ripozi. Ĝi eĉ dormi lin ne permesis . . .

Kaj unutage fortiris lin ia mistera volo tien, en tiun straton, por ankoraŭ unufoje vidi la malriĉan virinon.

Sed — ho ve! La malriĉa virino, kiu tiel bele rigardis tien en la malproksimon, kun sia eta infano, jam tie ne plu estis.

— Kie ŝi estas? Kie ŝi troviĝas? li demandis sin malesperege.

Kiu scias? Oni respondis al li malvarmtone.

Ha ha ha! — ekridegis li sovaĝe, venante hejmen. — La nevivanta bildo sur la tolo vivos eterne kaj ŝi mem, kun sia koro, kun siaj sentoj ien malaperis. Neniu scias kie ŝi troviĝas. Neniu eĉ ŝian nomon scias . . .

Ha ha ha! . . .

El la juda — *M. Tuler.*

— K-dino *Ani Minkova,* Oktjabrskaja, ul. 5, kv. 16, *Minsk,* PK, PI k. ĉ. l.

— K-dino *Dobrovolskij,* ul. Sazonova, 5, *Gomel,* pri ĉ. temoj PK, PI k. ĉ. l.

— "*Esperanto-grupo ĉe Stenografiaj Kursoj*", Teatralna-str. 10, *Kiev,* kun ĉiulandaj stenografistoj.

— K-do *Miĥaelo Vail,* ladisto, Bratska-str. 11, 9, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

— K-do *Gregoro Ĉuŝenko,* studento, Agronomia Instituto, Laborista Fakultato str. de Neronoviĉ, 2, *Kiev,* pri ĉ. temoj.

— "*Gelaboristoj-studentoj*" dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Krom PI oni sendu ion pli interesan. *Leningrad,* str. de Gercen 40, al esp. sekcio ĉe Industria Politeknikumo.

— "*Esperanto-Rondeto*" de teks-laboristoj kun tuta mondo pri div. temoj. Adr.: K-do *Burkov,* Klub B. I. V. M. Biblioteko, *Ivanovo-Voznesensk.*

— *Grupo Esperantista*" de intersindikata vesperlernejo dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Certe resp. Adr.: *Esperanto-Kruĵok,* Kiev-str. 19, Veĉern. ŝkola, *Kremenĉug.*

— K-do *E. Izgur,* Uĉiliŝĉnaja, 6/5, *Kremenĉug,* pri literatur., scienc., politik. demandoj, L, PK, plej volonte interŝ. nacilingvajn esp-aĵojn.

— "*Kom-junula ĉelo*" de Komunal-laboristoj pri kom.-jun., lab. vivo, pionirmovado, IRH-PK, L., IRH-eldonaĵoj. Adr.: *Annapolski,*Komunĥoz,*Kremenĉug.*

— Kremenĉuga Societo de Esp-Amikoj "*Laborista Solidareco*" aranĝas **Konkurson de Korespondado** okaze de organiziĝo de loka "*Labesko*" — Temoj: lab. vivo, batalo por internaciismo, forigo de naciaj trajtoj k. moroj, sukcesoj de kooperacio, esp. movado, ateista movado. — Po 1 plej bona koresp-aĵo el ĉ. lando premiota. — Plej taŭgaj let. represotaj. En "Senn." rezultoj komunikotaj. Adr.: *Laborista Solidareco, Kremenĉug.*

— K-do. *Georgo Marĉenko,* III. grupa, ŝkola, ii stupeni, *Tuapse* (Kaŭkazo) kun 13—18 jaraj k-doj pri ĉ. t. Resp. garantiata.

— 2. *Rajonnaja Biblioteko,* Vasiljevskaja 1, *Orel,* kun bibliotekoj kaj libroamantoj.

— *Grupo esperantista* (Esperanto-Kruĵok), Poĉta, *Orel,* pri ĉ. t. kolektive k. individue, nur L. Resp. nepra.

— K-do *Dolgiĥ,* d. Sojkino *P. O. Koskolovo,* Leningrad. gub., kun ĉiul. radiistoj.

— Dudek novaj esperantistoj *(Kruĵok Esperanto),* Raboĉij Klub im. Lenina, *Enakievo,* Doneck. gub., pri lab. kondiĉoj kaj kluba laboro. Certe resp.

— K-do *N. Lazarev,* militkursano, Voen. Polit. ŝkola ZVO., *Smolensk,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-dino *A. Nikolskaja,* Novo-Vsesvjatskaja, 22, *Smolensk,* pri kom., komjunularaj k. virinaj problemoj, L, PK, PI, k. ĉ. l.

— Celante perfektiĝi esperantlingve k. konvinki la ĉirkaŭantojn pri jama praktika aplikado de Esp., mi dez. koresp. kun samcelantoj-alilandaj pri div. tempoj. Adr.: K-do *J. Kuriĉ,* 1. Graĵdanskaja, 13, kv. 2, *Moskvo.*

— K-do *Stefan,* ŝkola 3. Internacio, *Ivanovo-Voznesensk,* dez. koresp. pri naturscienc-instruaferoj k. ĉ. l.

— La membroj de rondeto esp. ĉe uzino "Bolŝevik" dez. koresp. k. ĉ. l. Ili nepre resp. *Leningrad,* prospekt sjela Aleksandrovskogo, *Klub im. Lenina pri Zavode "Boljŝevik".*

— "Rostov-Dona esp. organizaĵo por fervoj-metiejo havanta 3800 laboristojn", dez. havi seriozajn korespondantojn pri lab vivo. Fervojistoj de ĉ. landoj sendu L, PI, al adreso: *Rostov-Don,* poŝtkesto n-o 82 por Lenmetiejoj.

UNS

PRODUKTIV-GENOSSENSCHAFT G. M. B. H.

Presejo kaj eldonejo

Laŭ plej moderna stilo estas liverataj: GAZETOJ // ĴURNALOJ VERKOJ // KATALOGOJ BROŜUROJ // AFIŜOJ en ĉiuj eŭrop. lingvoj

ESPERANTO-FAKO

Petu oferton k. katalogon

LIBROBINDEJO



LEIPZIG-CO. ELISENSTR. 163 TELEFON 35622

SENNACIECA REVUO

Monata Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

LITERATURO SCIENCO PEDAGOGIO

La marta kaj aprila n-oj aperas po 20-paĝa. Ambaŭ n-oj traktas virinajn temojn kaj estas speciale rekomendindaj al Esp-istinoj

Prospekton kaj provnumeron sendas senpage:

Administracio de SAT Rich. Lerchner, Leipzig O 27

SAT-INSIGNOJ



Rich. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1

Se vi ŝatas idealan libertempon, — kiu *vere* refreŝigas korpon kaj animon, — kiu redonas al ili la *naturon,* tiom mankantan al moderna homo, — kiu tial okazos en verda naturo, en *unike bela* Rejnregiono k. inter *gesamideanoj* diversnaciaj, — vi petos tuj prospekton pri

Verda Libertempo 1926

(esence tia, kia en 1925, dum pentekosta semajno) de *Leono Funken, Florinsmarkt 7a I, Koblenz (Germanio.)*

Nekrologo

Tragedia sorto estis fininta subite la laborplenan 26 jaraĝan vivon de nia SAT-kamaradino 1742

CHARLOTTE BARTH, instruistino.

Ŝi estis idealistino en plej vera senco de la vorto kaj ni dediĉas al ŝi dankeman memoron! *Glauchau-Sa.* (Germanio), marto 1926.

SAT-anoj de Glauchau.

Kun premanta malĝojo k-do Veniansin Vozdvijenskij kun la filino Lidio kaj filo Viktor sciigas esperantistaron pri neatendita morto de ilia kara edzino kaj patrino

MARIA PAVLOVNA VOZDVIJENSKAJA

Opera kantistino

Ŝi mortis 22. febr. 1926. Ŝi estis esperantistino dum 20 jaroj.

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas — Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo
Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 40 fr.; **Brazilio** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 40 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 50 lir. **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 10 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej. **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ 1/4 jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.